

EL KIĤOTO

ANTAŬPAROLO

Senokupa leganto: mi dezirus—kaj senjure vi povos kredi al mi—ke tiu ĉi libro, kiel filo de la intelekto, estu la plej bela, la plej graciplena kaj la plej diskreta el ĉiuj imageblaj. Sed mi ne povis malobei la naturan leĝon, ke ĉio en naturo naskas similaĵon. Kaj tiel, kion povus naski mia sprito senfrukta kaj nesufiĉe kulturita se ne historion de malgrasa, kuntiriĝa kaj kaprica filo plena je pensoj diversaj kaj de iu ajn neniam imagitaj kaj tia, kia povas naskiĝi en malliberejo, kie ĉiu ĝenaĵo trov^{as} difinitan por si lokon kaj loĝas ĉiu malgaja bruo? La senagiteco, kvieta loko, amuzeco kampara, sennubeco de la ĉielo, murmurado de la fontoj kaj spirita trankvileco multe kunhelpas por ke la plej senfruktaj muzoj montriĝu produktemaj kaj prezentu kreaĵojn supersatigantajn la mondon per miro kaj kontento. Okazas ofte ke patro, kiu havas malbelan kaj sengracian filon, blindiĝite de la amo, kiun li havas por li, ne vidas liajn malbonaĵojn, tute alie, ŝatas ilin kiel saĝaĵojn kaj belajojn kaj ilin raporta^s al siaj amikoj kiel spritaĵojn kaj ĉarmoĵojn. Sed mi, ŝajna patro kaj vera duonpatro de Don Kiĥoto, ne volas konduki laŭkutime nek petegi vin, karega leganto, preskaŭ kun larmoj en la okuloj, kiel aliaj faras, ke vi pardonu aŭ ne atentu la malbonaĵojn rimarkatajn en mia filo, ĉar vi nek parenco nek amiko lia estas, animon havas ĉe via korpo kaj plena agliberon, estas en via hejmo kie vi ĉefas same kiel la reĝo estas majstro de siaj fortikaĵoj kaj ankaŭ vi scias kion oni diras kutime: «kaŝate de mia mantelo mi mortigas la reĝon». (1) Ĉio ĉi senigas kaj liberigas vin je ĉiu respekto kaj devigo kaj tiel, vi ion ajn povos diri pri tiu ĉi historio ne timante kalumnion aŭ premion pro via malfavora aŭ favora juĝdiro.

Nur mi dezirus al vi prezenti ĝin sensuperflua, nuda kaj ne ornamita de antaŭparolo nek de katalogo kaj sennombreco da kutimaj sonetoj, epigramoj kaj laŭdoj, kiujn oni ofte antaŭmetas je komenco de la libroj. Ĉar mi povas diri al vi, ke, malgraŭ la klopodo postulita de ĝia verkado, nenio ŝajnis al mi pli pleniga ol elfari ĉi tiun antaŭparolon, kiun vi nun tralegas. Por verki ĝin, mi prenis la plumon multfoje, kiun mi forlasis multajn fojojn, nesciante kion skribi; kaj foje, kiam mi estis halte, kontraŭ la verkpapero,⁴ tenante plumon sur la orelo, kulbuton apogitan sur la skribotablo kaj mano sub la vango, dum mi pripensis kion mi pridirus, eniris senatende amiko mia, lerta kaj sprita, kiu vidante ke mi estas tiel imagema, demandis min pri la kialo, kaj ne kaŝante ĝin, mi diris al li ke mi pripensas la verkotan antaŭparolon por la historio de Don Kiĥoto kaj ke ĝi tiel multe embarasas min ke mi ne volas elfari ĝin nek publikigi la heroaĵojn de tiel nobla kavaliro.

Esperantigis V. I. O.

(1) Hispana popoldiro.